

Dana

1

Fervojisto

ISSN: 1397-9914

70a jareldono

Junio 2017



La folkloro grupo *Vogesia* distris dum la 69-a IFK en *Colmar*, vidu p. 13.
Fotis *Jan U. Niemann*.

DEFA ĝeneralkunveno okazis 7/3-2017.

Denove nia asocio okazigs la jaran ĝeneralkunvenon. Ni ĉiuj memoras la 'bonajn malnovajn tagojn', kiam DEFA aranĝis jarkunvenojn kun prelegoj, tranokto kaj festo ... jam de multaj jaroj la fortoj ne estas sufiĉaj por tiaj aranĝoj, sed tamen ni ĝuas esti kune, ankaŭ dum la ĝeneralkunveno, kvanam ĝi estas malpli 'formala' ol antaŭe.

La ĉijara ĝeneralkunveno okazis en Køge. La protokolon kaj la ekonomian bilancraporton oni povas akiri ĉe la sekretario.

Kvankam ni ne havas grandajn hom- kaj laborfortojn, daŭre ni sukcesas esti aktivaj membroj de FISAIC, IFEF kaj Jernbanefritid. Rilate al FISAIC, ekde la jarŝanĝo Jan estas ĝeneraa sekretario de FISAIC, kaj estas granda tasko kaj granda atingo de 'eta' societo kiel nia.

Entute ni povas fieri pri niaj aktivecoj, ankaŭ ke ni sukcesas dum la jaro unufoje monate okazigi kunvenon - ni renkontiĝas, manĝas kune, solvas taskojn ... kaj kelkfoje vidas fotojn de okazintaj kongresoj kaj parolas pri la multaj komunaj travivaĵoj kaj memoroj.

Ni prezentis prelegon dum la kongreso en Varna 2016 kaj planas ankaŭ por la kongreso en Colmar ion. Nia societo vivas, kaj ni ĉiuj kontentas.

DEFA



Colmar, kongresurbo de IFEF 2017.

Otto Busses Vej 5Q

DEFA Kopenhago 'hejmis' en pluraj diversaj lokoj dum la jaroj, sed verŝajne la ligna barako (vidu fotojn en tiu artikolo) estis la plej ŝatata.

Dum multaj jaroj per helpo de DSB Jernbanefritid (tiam DJF) povis disponigi al siaj diversaj societoj kaj kluboj salonojn kaj klubejojn dise en Kopenhago – certe ankaŭ aliloke, sed mi ĝuis tiun eblecon. La klubejoj estis senkostaj, kaj estis ege granda helpo al eta asocio, kiu kun modesta kotizo povis tamen havi grandan aktivecnivelon.

Dum la jaroj oni devis kelkfoje translokiĝi, ĉar DSB vendis la domon, kie oni 'hejmis', okazis strukturŝanĝoj, kaj subite DSB ne plu posedis la domon ... kaj finfine, kun la pli kaj pli streĉa ekonomia kaj konkurenca situacio, ne plu estis eble tiel 'loĝi'; almenaŭ nur tre malmultaj kluboj kadre de JF daŭre havas tiajn eblecojn.

Sed ... mi estis bonŝanca membri en DEFA Kopenhago, kiam tiu klubo kune kun la kopenhagaj ŝakludantoj rezidis en Otto Busses Vej 5Q, ligna barako tuj ĉe la lokomotivmetiejo kaj la ranĝtereno. Tuj apud la konstruaĵo estis rangŝpuro, kiun oni diligente uzis vespere, kiam ni kunvenis. Mi miras, ke oni povis koncentriĝi pri ŝakludado en la salonoj.

Mi rakontis pri la 'Olda pavilono' pasintnumere ... tie komencis mia Esperanta vivo, kaj el ĉiuj klubejoj kaj salonoj ĝi havas la plej grandan lokon en mia memoro ... povas esti, ke ĝi estis iom kaduka, lika kaj malnova, sed ni tre ŝatis esti tie, kaj ni tre, tre bedaŭris, kiam finfine oni decidis forigi la malnovan, lignan barakon 5Q.

Du el niaj 'kortegaj poetoj' verkis pri 5Q – Poul Thorsen, fama dana esperanto-poeto / tradukisto / verkisto / instruisto / debatanto, hejmis ĉe ni, kvankam ne fervojisto, kaj ni tre ĝojis pro tio kaj multe profitis je liaj kontribuoj al klubaj vesperoj kaj kluba vivo. Ne malplej en formo de kantoj li faris sian parton, kaj li verkis 'Pluso por Otobuso' – kompreneble laŭ melodio '*! den gamle pavillon*' ('En la olda pavilono'):

En la hejmpaĝaro pri verkoj de Poul oni skribas unue pri la klubo, la ĉirkaŭaĵoj kaj kondiĉoj, kaj poste aperas la kanto.

La poemo estas eminenta priskribo de la faroj kaj etoso en ligna barako en Otto Busses Vej n-ro 5Q en Kopenhago, kiu estis metita je dispono al libertempaj aktivecoj de fervojistoj, kaj kie dum multaj jaroj gis la 5a de novembro 1990 la kopenhaga DEFA-grupo kolektiĝis ĉiun labortagan lundon de la jaro.

La barako enhavis du grandajn kaj unu malgrandan ĉambrojn - unu el la grandaj estis nomumita laŭ unu ella fondintoj de la libertempa asocio de la fervojoj: Henry Klein.

Tuj ekster la fenestroj estis trako, laŭ kiu regule dum la vespero estis transportitaj vagonoj kun konteneroj, kaj tio kompreneble kaŭzis bruon kaj malfacilon aŭdi, kio estis parolata endome.

Ni mem prizorgis trinkaĵojn, kaj pluraj preferis bierojn en kvanto, kiu levis la etoson sen eksceso. Fine de 1990 oni neniigis la barakon, kion bedaŭris la uzantoj, sed ĝi estis fendhava kaj pro tio kostis tro multe por varmigi.

DEFA-membro estas mi denaske,
mi lernis haste
la lingvon flaske.
Ĉiulunde iras por amuzo
al Otobuso
pro la soif'.
La soifo al la kara ideal',
pli kara ol tv-kanal'.
Mi sentas min ujutne en la olda pavilon'
ĉe la Ørsted-funelar'.
Mi stumblas laŭ la reloj ĝis la eksa Q-peron'
laŭ la kontenero-flar'.
Mi palpas vojon tra la nubofumoj,

dum ŝvupas la botel-malferma son',
kaj trovas mian lokon post brakumoj
en la olda pavilon'.

Kio okazadas laŭprograme
por mi tutsame,
ĉar ĉiam trame
vagonaroj preterstamfe ĝemas,
la tero tremas
dum nia kant'.
Tra la tuta jar' paradas por parol'
soldatoj álatordenskjol.
Mi sentas min ujutne en la olda pavilon'
eĉ en neĝo-uragan',
nur iomete surda - ho, diable sen pardon'-
pro la DSBusoplan'.
Kun or-biero antaŭ nazobeko,
dormete en angulo ĉe kolon'
nenion povas perdi dum prelego
en la olda pavilon'.

Tie en Salono Henry Klejne
ĉiusemajne
mi restas kaj ne
levas mian pugon dum ordigo
kaj fanatiko
de l' lingva band'.
Unu lasta gut': bruliga pulimut
por kuireja fin-salut'.
Mi sentas min ujutne en la olda pavilon'
spite al purig-frenez'.
Mi lasas al aliaj kuri al la stacidom'
por la lasta nokt-ekspres'.
Mi faras laŭkutime post festeno

kun la promilo unu kaj duon':
Mi dormas ĝis la lunda studreveno
en la olda pavilon'.

Oni decidis malkonstrui nian karan barakon kaj komencis en novembro 1990 ..



Ni ricevis novan ejon, fakte ni tute ne rajtas plendi – sed tamen, estis kun grandega bedaŭro, ke ni forlasis 5Q. Je la fina klubvespero en la barako (mi eĉ ne memoras, ĉu ni ploris aŭ ridis – verŝajne ambaŭ) Poul verkis lastan strofon por la kanto.

Tiam mi opiniis 'nur', ke estas amuza kanto, kaj ke oni vidas de la teksto la suverenajn talentojn, kiujn havis Poul – artisto je vortoj, en pluraj lingvoj eĉ!

Sed poste, kaj kiam mi nun denove legas tiun tekston, mi komprenas, ke estas verkita kaj skribita kun granda amo de li – kiu ne 'nature' apar-

tenis al la fervojista movado, sed kiu trovis sian lokon tie. Kun granda amo kaj respekto ni memoras lin kaj liajn multajn kontribuojn ankaŭ al nia klubo.

Jen la lasta trofo:

Lasta strofo nun en Otobuso
kaj lasta duŝo
en mia buŝo.
La konfuzo kaj la inventaro
al la estraro
kaj DSB.
Lasta rukto pri l' Varmeta Krokodil'
kaj julemika punĉ-distil'.
Mi sentiĝis min ujutne en la olda pavilon',
ŝvupiĝ lasta lund-bier'.
Denun mi mutas same kiel nia telefon',
portu min al kontener'.
Mi dankas nun la mil memoro-belojn
(pri kelkaj fuŝaj petas pri pardon')
kaj fine ĵetas miajn tri ŝovelojn
sur la olda pavilon'.



Ejlif Andersen, dum multaj jaroj prezidanto de DEFA Kopenhago, estis tre lerta rilate al rim-farado kaj oftege verkis kantojn en la klubo kaj ankaŭ por Jernbanefritid, kiam okazis la ĉiujaraj grandaj festoj. Ejlif verkis kanton en la dana pri la malnova domo – mi ne memoras, ĉu ni kantis ĝin kadre de Jernbanefritid, sed mi opinias ke ne, ĉar ankaŭ Jernbanefritid ne ĝojis, ke ni devas forlasi la ejon. Ĉu aŭ ĉu ne, tre trafa kaj bele farita ĝi estas, kaj akoraŭ nun la emocioj estas la samaj, kiam mi legas la tekston. Kiel Poul Thorsen ankaŭ Ejlif zorge elektis la melodion – *'Det gamle træ, o, lad det stå'* ('Ne dehaku la malnovan arbon').

Ode til et ældre hus

mel.: Det gamle træ, o, lad det stå ...

Imellem spor et hus der står,
hvortil vi vejen finder.
Desværre nu man foreslår,
at dette hus forsvinder.
Hvor er det trist at tænke på!
Her har vi minder kære.
Det gamle hus, o lad det stå,
her er så godt at være.

Fra Dybbølsbro er vejen lang,
men vi med glæde traver.
Dog er det en besværlig gang,
når man langs vejen graver.
Så har vi ofte måttet gå
igennem dynd og ælte.
Vort gamle hus, o lad det stå.
Det må I ikke vælte.

I huset er der lystig snak,
man Esperanto taler,
og som det også sker ved skak,
man med en øl sig svaler.

Her kan en bonde konger slå,
her sunget bli'r en kanto.
Vort gamle hus, o lad det stå
til skak og Esperanto.

Der tit har været stemning fin
i husets gamle sale.
Når vi holdt fest med mad og vin,
lød sang og munter tale.
Ved juletid vi kunne gå
om træ med lys og stjerne.
Vort gamle hus, o lad det stå.
Det må I ikke fjerne.

Alt gnavet er af tidens tand,
det fra hvert vindu' trækker.
Ej no'et mer' bliver sat i stand,
og husets haner lækker.
Det gamle hus af ælde grå
har charme trods sin alder.
Vort gamle hus, o lad det stå
til af sig selv det falder.

Dog uret falder snart i slag.
At klage kan ej nytte.
Vi ved, der komme vil en dag,
da vi herfra skal flytte.
Måske et endnu bedre sted
vi til vor syssel finder.
Vi tror, at nissen flytter med
i form af vore minder.

Mi scias, ke ni forlasas iomete la principon, ke nia bulteno 'Dana Fervojisto' estas pure esperantlingva, kaj mi konscias, ke verŝajne nur DEFA-anojn, kiu travivis tiun tempon, povas vere interesi tio. Sed tamen – estas parto de mia kaj de nia historio kaj montras la solida-

recon, la respekton, la amon kaj la ĝojon, kiuj estis por ni natura parto e kluba vo, kio estis verdire 'multe pli ol kluba vivo' ...



LN

Ĉiuj fotoj de Erik V. Petersen, copyright www.evp.dk. Ni kore dankas, ke li permesas al ni ilustri per tiuj fotoj.



Venonta IFK okazos en Pollando

DEFA-aktivecoj dum la somero ktp.

Kiel pasintjare, ankaŭ dumsomere ni renkontiĝas por havi la stabilan kontakton kaj sekvi la taskojn kaj evoluon ĉe IFEF, *Jernbanefritid* kaj *FISAIC*.

Ni programis jam la ceterajn kunvenojn de 2017. Povas okazi ŝanĝoj, kaj ni petas vin informiĝi ĉe la prez.

Marde, la 11an de julio. Ni ekskursos al Gavnø kaj Karrebæksminde. Informoj ĉe la prez. pri renkontiĝloko kaj horo.

Marde, la 19an de septembro ni ekskursos al la Fervojmuzeo en Odense. Informoj ĉe la prez. pri detaloj.

Marde, la 17an de oktobro - informoj ĉe la prez. pri preciza horo kaj loko.

Marde, la 14an de novembro - informoj ĉe la prez. pri preciza horo kaj loko.

Marde, la 12an de decembro - informoj ĉe la prez. pri preciza horo kaj loko.

Aliaj Esperanto-aktivecoj en Danio:

Kopenhago

Kunvenoj de KEK (prezidanto: *Bent Jensenius*, tel 38 60 15 86, retadreso kek@esperanto.dk) okazas en *Kulturhuset, Tomsgårdsvej 35, 2400 Kbh NV*. Vidu ankaŭ www.esperanto.dk

Århus

Kontaktulo pri DEFA: La prezidanto.

Kunvenoj okazas kunlabore kun la Esperantoklubo de Århus en *Folkestedet, Carl Blochs Gade 28, 1^a etaĝo, salono 7, je h 19.30*, la lastan ĵaŭdon de la monato.

Norda Jutlando:

Kunvenoj de Nordjutlanda Esperanto-Klubo (informoj: *Ejnar Hjorth*, tel. 98 13 40 40) okazas en la vintra sezono (septembro-majo) ĉiumerkrede je la 15-a horo en *Christiansgade 38, 1., Aalborg*

**69a IFK, Colmar – en majo, en majo, en majo!**

Parto de la ĉeestantaro dum la solena malfermo de la kongreso
Ĉiuj fotoj: Jan U. Niemann

PREPARI la 69-an IFK-on certe ne estis facila tasko. Lokaj membroj de Esperanto-France Est, iom pli disaj IFEF-estraranoj kaj kelkaj FFEA-membroj dum du jaroj laboris – kaj KUNlaboris, tiel ke ĉefine la 16an de maj ĉio estis preta por bonvenigi la kongresanojn: taŭga hotelo bone situanta, kie granda plimulto de la kongresanoj loĝis (ĉiam avantaĝo loĝi kune), taŭga kunvenejo kaj ĉiuj kunventagordoj, distraj programoj, fakprelegoj, eskursoj ...

PARTOPRENI la 9-an IFK-on estis tre facile. Ni aŭvenis al la stacidomo de Colmar kaj estis tuj inter amikoj.

Estis bela semajno kun plejparte bona vetero. La hotelo kaj kongresejo ambaŭ situis tuj ĉe la rando de la tre ĉarma malnova urboparto de Colmar, kaj dum la manĝopaŭzoj kaj dum 'Liberaj' horoj estis ebleco esplori la tuton. Manĝejoj multas en Francio, kaj precipe en 'La petite Alsace' kaj 'Pfeffel' la kongresanoj estis oftaj gastoj dum la semajno.

Kelnero miris pri la lingvo, kiun parolis inter si la klientoj, kaj ankaŭ ni scivolemis pri la lingva brodaĵo de la regiono – germana, franca (ambaŭ kun forta akcento) kaj alsaca. – Nia kongreso temas ja pri lingvo!



Ni ekskursis al Kaysersberg

Nur la matenmanĝon ni havis en la hotelo, kaj kun ĉ. 140 kongresanoj en la hotelo kaj nur 48 sidlokoj en la manĝosalono fariĝis de tempo al tempo iom streĉa, precipe por la kuirejaj laborantoj, sed ĉio pasiĝis glate kaj kun bona humoro, eĉ helpis al la ĝenerala sinteno de familieco.

Ĉiam en Francio belas la kultura programo La folkloro grupo Vogesia (vidu la frontpaĝon) distris per dancoj, kaj bona tradicio nun jam estas ke itala kantistino *Grazia Barboni* dum unu vespero koncertas. Oni apenaŭ lasis al ŝi forlasi la scenejon.

Fake la kongreso estis tre varia. Ni vizitis la fervojmuzeon 'Cité du train', la TAKE-asocio preparis por la kongreso specialan numeron de sia faka bulteno, FFK25 aperis – kaj de la fakaj prelegoj menciendas

- Pri sanprizorgado de ĉinaj fervojistoj (Ĉinio)

- Pri tegentistaj labormetodoj kun ekzemploj (TAKE)
- Pri nova fervojlinio Dresden-Prago (Ĉeĥio)
- Pri stacidomo de Zagreb (Kroatio)
- ...



Tipe por la regiono – cikonioj

Precipe la TAKE-kunlaboro kun IFEF por tiu kongreso estas laŭ mi interesa, kaj espereble formaligoŝ avantaĝe al ambaŭ asocioj. Almenaŭ MI post la prelego pri tegmentoj ne povas preterpasi domon sen studi tementovalojn kaj 'nastukojn'!



La fervojmuzeo 'Cité du train'

Du someroj eksterordinaraj por Kystbanen

Por ke *banedanmark* renovigu la relojn inter *Helsingør* kaj *Hellerup* oni dum ses semajnoj en 2017 kaj same en 2018 veturos per aŭtobusoj anstataŭ trajnoj. Tio donas multe da ekstra kaj ne-ordinara laboro al *banedanmark* kaj al *DSB* ... sed ankaŭ al Michael Randropp, la reprezentanto de la 'Naveda Klubo por Kystbanen'. Dum ok jaroj li havas tiun taskon por la klubo, kiu nun havas 3.500 membrojn. Kompreneble multe pli da homoj ĉiutage navedas, sed la klubo estas la rekta ligo inter *banedanmark*, *DSB* kaj la pasaĝeroj.



Michael Randropp

Temas pri tri aferoj: informado, informado, informado! En la ĉiutago, kiam okazas subitaj malfruoj kaj nuligoj, kaj kiel nun, kiam temas pri granda, planita tralaboro. Se la pasaĝeroj ricevas bonan, ĝustatempan kaj precipe signifan kaj utilan informon, multe bli bone funkcias la tuto.

Se la instancoj uzas la navedan klubon por informi, oni atingas multajn homojn rapide kaj samtempe, kaj kompreneble Michael Randropp esperas, ke dum tiu grandega projekto la komunikado kaj informado estu inter la gravaj kaj bone prizorgataj taskoj.



Dana Fervojisto estas organo de Dana Esperantista Fervojista Asocio (DEFA)

Prezidanto:

Jan U. Niemann
 Hovedvagsstræde 9 E, 1
 DK-3000 Helsingør
 tel 71 70 63 83
 aŭ 71 72 32 42
niemann@kabelmail.dk

Kasisto: Karen K. Olsen
 Manøvej 6
 DK-4700 Næstved
 tel 55 72 73 77
 bankkonto (Lån&Spar)
 0400 107 10 07539

Redaktantoj: Jan kaj Lene
 Niemann
 Vidu adreson supre.

Preso: HVS9E1

Redaktofino por venonta numero de Dana Fervojisto:

1/11-2017

Enhavo:

- paĝo 2 Ĝeneralkunveno de DEFA
 paĝoj 3-10 Pli da memoroj ... Otto Busses Vej 5Q kaj ĝia malapero
 paĝoj 11-12 Aktivecoj
 paĝoj 13-14 69-a IFK okazis
 paĝo 15 Traklaboroj ...

UEA kongresos por la 102-a fojo – en Seulo, Korea Respubliko



La kongreso okazos de la 22-a ĝis la 29-a de julio. Ĝis nun aliĝis 1079 personoj el 61 landoj.